

Krilo

Krilo (krill) estas norvegdevena vorto kaj signifas cetacan nutraĵon. En pli mallargâ senco, krilo estas *Euphauside* tio estas etaj kankroj, kiuj estas partoj de bestoplanktonoj kaj apartenas al salikoko-similaj krustuloj de la ordo *Euphausiacea*. La plej konata specio estas la antarkta krilo (*Euphausia superba*).

Kriloj formas grandegajn svarmojn. Krilo longas ĝis 6 cm, pezas 2 g kaj verŝajne vivas ĝis 6 jaroj. La “stomako” brilas verde tra la travidebla haŭto, kaj pruvas tion, ke *Euphausia superba* nutras sin per vegetoplanktono, specife silika algo, kiun ĝi filtras el la akvo per fascina kaptokorbo. Krilo povas demanĝi ankaŭ algojn de la suba flanko de flosglacio. Krilo nomiĝas ankaŭ lumsalikoko aŭ lumkankro, ĉar sur la okuloj kaj sur la korpo troviĝas lumorganoj, kiuj elsendas flav-verdan lumon (bioluminesko).

Pliaj gravaj krilaj specioj vivas en Nordatlantiko (*Meganyctiphanes norvegica*) kaj en Pacifiko (*Euphausia pacifica*).

La biomaso estas taksita je 100-800 milionoj da tunoj, tiel *Euphausia superba* estas verŝajne la plej sukcesa bestospecio de la mondo. Ĝi formas bazon de la antarkta ekologisistemo kaj estas la ĉefa nutraĵo por cetacoj, fokedoj, sepioj, pingvenoj, albatrosoj kaj aliaj birdoj.

La tuta kaptado de *Euphausia superba* sumas jare ĉ. 90 000 tunojn.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Krilo